Claude PIRON

**1931. Loĝas en Gland VD*



Post altaj komercaj studoj en Antverpeno, Belgio (1948-53) kaj la diplomiĝo en la traduklernejo de la ĝeneva universitato, P. laboris ĉe UN en Novjorko kiel tradukisto el la lingvoj angla, ĉina, hispana, kaj rusa al la franca kaj kiel redaktoro-protokolisto (1956-61). Kiel dungito de la Monda Organizo pri sano en Ĝenevo (1961-71) li aktivis en orienta Azio, en la pacifika regiono kaj en Afriko. 1956-61 kaj 1966-75 li studis psikologion kaj plenumis trejniĝon kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto (en la ĝeneva Instituto Charles Baudouin). De 1971 P. laboris kiel privata psikoterapiisto nemedicina, agnoskita en 1988 de la vaŭda sandepartemento. De 1973 ĝis sia emeritiĝo en 1994 - en 1978 li fariĝis svisa civitano - li docentis en la psikologia kaj edukscienca fakultato de la ĝeneva universitato kaj en la Internacia Instituto de psikanalizo kaj psikoterapio i.a. pri la rilatoj inter emocia vivo, strukturiĝo de la personeco kaj disvolvo de la konaj funkcioj. Lige kun sia profesio P. gvidis multajn seminariojn kaj staĝojn aŭ prelege kontribuis en ili. P., kiu en 1999 translokiĝis de Coppet/VD al Gland/VD, plu aktivas kiel psikoterapiisto, ĉefe okupiĝante pri la trejnado de junaj psikoterapiistoj/psikanalizistoj, prelegante kaj gvidante staĝojn aŭ terapiajn grupojn.

Kelkaj libroj de Claude Piron

Kiam P., e-isto de 1943, laboris en Novjorko, li kunfondis la UN-EK, t.e. klubon por UN-funkciuloj (ĉ. 1957), kies unua prezidanto li ankaŭ estis. Dum la 60aj jaroj li reprezentis UEAn ĉe UN kaj rolis kiel UEA-delegito en Ĝenevo. Li partoprenis la aktivecojn de la ĝeneva EG La Stelo kaj de SES kaj estis redaktoro de *SE* (1963-66). En malferma letero (1975) al la direktoro de Monda Organizo pri sano li rekomendis Eon kiel taŭgan solvon de la lingva problemo de tiu organizo. P. estis rektoro de la Somera Universitato en Eo dum ties 32a sesio okaze de la 64a UK (Lucerno 1979) kaj de IFA de KCE. En 1981 kaj 1983 li instruis Eon en la sanfranciska ŝtata universitato kadre de someraj kursoj. Internacie konata P. fariĝis pro siaj oftaj prelegoj en Eo-medioj kaj precipe kiel verkisto kaj aŭtoro de pli ol 20 originalaj libroj en Eo kaj pro aliaj gravaj publikigoj en kaj pri Eo. Sub la pseŭdonimo *Johán Valano* P. aperigis inter 1976 kaj 1982, ĉefe en la eldonejo Stefeto (Antverpeno/La Laguna), kvin krimromanojn en la fama ‘Ĉu-serio’, poste sekvis ankoraŭ la novelaro *Ĉu rakonti novele?* Alia famekonata teksto de P. estis eldonita sub la titolo *La Bona Lingvo* (1989). (→Bibliografio) P. gajnis plurajn premiojn: En 1955, kadre de la Belartaj Konkursoj de UEA, P. ricevis la poezian premion, kaj en 1993 sekvis la Premio Deguĉi. Lia ĉefa nacilingva kontribuaĵo rilate al la monda lingva problemo kaj Eo estas *Le défi des langues. Du gâchis au bon sens* (L’Harmattan Paris 1994). La redakcion de PIV2 P. konsilis rilate la psikologian terminologion.

Claude Piron en Rolle, septembro 2003
(fotis S. Keller)

P. ĉiam elpaŝis kiel tre engaĝita pledanto favore al la planlingvo Eo kiel alternativo al la lingva kaoso en internaciaj organizoj, kies situacion li bone konas de interne; oni spertis lin kiel ardan preleganton kaj interesan rakontanton, kun multaj teoriaj konoj kaj praktikaj spertoj pri psikologio kaj la monda lingva problemo, du kampoj, kiujn li kompetente interrilatigis en sia interpretado de fenomenoj. En iu intervjuo P. diris, ke li bezonus almenaŭ tri paralelajn vivojn por fari ĉion, kion li devus (aŭ volus) fari. En 1998 UEA nomis lin honora membro, SES en 2006.

La aktivecojn de P. ofte aktive partoprenis lia edzino →*Nicole P.* (*1934). Ankaŭ iliaj tri filinoj komprenas Eon kaj restis principe favoraj al ĝi, kvankam ili dume ne uzas ĝin.

→Ĝenevo →SES →KCE
→Bibliografio →Antologio